



I

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

JANUARO 1963

E N H A V O

	Paĝo
* * * 1963 — jaro de la junularo	1
* * * 48-a Universala Kongreso de Esperanto	2
Nikola N. Kolov. Esperanto-kinoklubo	3
* * * Novaj societoj	3
* * * Dua plenkunsido de la Centra Komitato de BEA	4
Tibor Sekelj. Saluto al la esperantistaro desur Kilimanĝaro . .	7
* * * Montodomo „Esperanto“	7
Georgo DeSik'n. Sonetoj	8
Radoj Ralin. Balado pri la mortigita kanto	8
Toma Ajolov. Medito post nova jaro	8
Nikola Pilev. Jubileo de Zora Mladenova-Hans	9
* * * Junularo sur posteno	10
Atanas D. Atanasov — Ada. Mia unua letero (12-a leciono) .	13
A. Kohn, N. Steinberg. Kien ni ias? (Recenzo)	14



V - 19479

Abonkotizo: jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlandaj — 2 lv, 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levoj por cm²; korespondanconcoj: 5 stotinkoj, or ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tiranë.	NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.
ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova	RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5
KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.	SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162
	SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

104176 d.



1963 — JARO DE LA JUNULARO

Konsiderante la eksterordinaran rolon, kiun ludas kaj devas ludi la junularo en nia movado kaj dezirante doni novan impulson, enkonduki novajn metodojn de agado kaj ĝenerale akceli la disvastigon de la internacia lingvo inter la junularo, la komitato de TEJO en Ystad decidis proponi, ke la jaro 1963 estu deklarita Jaro de la Junularo en la Esperanto-movado. Nun tiu propono jam estas decido de la estraro de UEA kaj tiu ĉi nova granda kampanjo estos komuna klopodo de TEJO kaj UEA. Kvankam la agado troviĝos ĉefe en la manoj de la junuloj mem, la movado kiel tuto, ĉiuj funkciuloj — de la gvidorganoj ĝis la aparta membro kaj sur ĉiuj niveloj — internacia, landa kaj loka, devas apogi kaj helpi la efektivigon de la planitaj iniciatoj, devas garantiĝi sian propran estontecon.

Kion praktike signifas la Junulara Jaro?

Je internacia skalo ĝi signifas: konsiderindan intensigon de la aktiveco de TEJO, unuecigon de la organiza strukturo de la landaj sekcioj kaj plivigligon de iliaj kontaktoj ĝis plej intima kunlaboro sur kampoj organiza, kultura kaj turisma; fondon de novaj junularaj sekcioj en pluraj landoj en kaj ekster Eŭropo; entreprenon de vasta kaj atente preparita informkampanjo antaŭ pluraj internaciaj neesperantistaj junularaj organizaĵoj, celante seriozajn kontaktojn kun ili, ĝis eventuala enkonduko de Esperanto en ilia praktika laboro; starigon de internacia junulara revuo ne pri Esperanto, sed ĉefe en Esperanto, respegulanta la tutan palettron de interesoj de la nuntempa junularo.

Unu verova kaj interesa gazeto, komuna produkto de la ideoj kaj talentoj de la esperantista junularo estas nun unu el la plej rapide solvendaj taskoj de TEJO. Speciala fonduso estas starigita por ebligi la eldonon de la unuaj numeroj.

Nia bulgara junularo ĉiam estis aktiva taĉmento de la movado kaj ne hazarde la ideo pri la Jaro de la Junularo eliris el ĝiaj vicoj. Bulgara Esperanto-junularo devas disvolvi dum tiu ĉi jaro konsiderindan organizan laboron por fando de novaj junularaj grupoj en ĉiuj societoj de BEA, konforme al la decido de nia 35-a kongreso. La societoj devas krei kondiĉojn por memstara agado de la junuloj, por disfloro de iniciatemo kaj kreaĵfortoj de la junularo. konsiderinde devas plialtiĝi la rolo de la junulara paĝo en „Bulgara Esperantisto“, kiu ne nur formale, sed laŭ formo kaj enhavo devas efektive esti organo de BEJ.

Senhezite oni povas diri, ke la kulmino de la Junulara Jaro, kaj el nacia kaj el internacia vidpunkto, estos la 19-a Internacia Junulara Espe-

48-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO



Rekorda aliĝado. Ĝis 20. 12. 1962 aliĝis 672 personoj el 29 landoj. Komparante tiun ĉi nombron kun la statistikoj de antaŭaj kongresoj, evidentiĝas ke aliĝis al la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio multe pli da kongresanoj ol en la aliaj, proksimume je la sama tempo. El Bulgario aliĝis 282.

Oratora Konkurso. La Estraro de UEA fiksas la jenajn temojn por la Oratora Konkurso:

1. Kiel reciproka aprecio de kulturoj povas helpi al interkompreniĝo inter la popoloj.

2. Kion mi opinias pri la Esperanta literaturo.

3. Ĉu ekzistas opono inter arto kaj scienco?

4. Kiel mi konceptas la rolon de internacia Esperanta teatro.

5. Kiel teknikoj helpas al la kultura progreso.

6. Kio estu la enhavo de kultura agado de la junularo.

El la Regularo pri la Oratora konkurso:

Art. 2. Rajtas partopreni ĉiuj gejunuloj; ĝis 28-jaraj, kiuj aliĝis al la konkerna U. K. kaj partoprenas ĝin. La partopreno en la konkurso estas senpaga. . . .

Art. 4. La konkurso okazas publike. . . . La Oratora Konkurso okazas en la Internacia Lingvo. La kandidatoj devas paroli pri la temo libere, sen anticipe skribita teksto, sed ili povas uzi memorigajn notojn. Ĉiu kandidato rajtas paroli dum proksimume 10 minutoj, sed la komisiono povas, depende de la nombro de kandidatoj, longigi aŭ mallongigi tiun limtempon. . . .

Art. 6. . . . La landaj asocioj kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj povus okazigi similajn konkursojn dum siaj landaj kongresoj aŭ aliaj renkontiĝoj kaj ebligi al la gajnintoj la partoprenon en la konkurso de UEA. La kompleta regularo pri la Oratora Konkurso troviĝas en la februara numero de „Esperanto“.

(daŭrigo sur p. 3)

(daŭrigo de p. 1)

ranto-Kongreso en Vraca de 27. VII. ĝis 3. VIII. 1963. La bulgara junularo havas la ŝancon kaj samtempe la respondecon organizi tiun, decide gravan por la junulara movado, kongreson. Al ĝia preparo kaj propagando nun oni devas subigi la tutan agadon de la junaj esperantistoj. La aktivigo de la malnovaj membroj, la lingva perfektigo kaj la kulturaj aktivecoj devas esti inter la unuaj zorgoj por ĉiu junulara grupo. Ankaŭ la tradicia tutlanda balo, ĉi jare en la formo de festivalo, estiĝos lasta provo antaŭ la Kongreso. Al laboro, gekamaradoj, en la Nova 1963 jaro — nia jaro!



Internacia Konferenco de Lernejoj. La internacia konferenco de la lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata, okazos la 29-an, 30-an, 31-an de julio kaj la 1-an de aŭgusto 1963 en Beograd (Jugoslavio).

Ĉar la konferenco havas gravegan signifon por la plua enkonduko de Esperanto en la lernejojn, estas dezirinde, ke en ĝi estu reprezentitaj ĉiuj lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata.

La tagordo de la Konferenco konsistas el jenaj diskutendaj temoj:

1. Kontribuo de Esperanto al la internacia kompreniĝo.
2. Kontribuo de Esperanto al la ĝenerala instruado.
3. Ĝisnunaj organizaj spertoj rilate al la enkonduko de Esperanto en la lernejojn de opaj landoj kaj niaj komunaj taskoj.
4. Modernigo de E-instruado kaj unuigo de ĉiuj fakaj fortoj je tiu plano.
5. Okupiĝo pri infanoj kaj junularo ekster la E-instruado.

Krom reprezentantoj de la lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata, la konferencon devus partopreni oficialaj delegitoj (komisiitoj por la instruado) de landaj asocioj. Estas sugestinde ke la landaj asocioj ebligu kaj faciligu al la reprezentantoj kaj la delegitoj partoprenon al la konferenco.

Pli detalajn informojn donas la Organiza Komitato (Jugoslavia Esperanto-Ligo — por IKL, Terazije 42, Beograd, Pf 201, Jugoslavio).

ESPERANTO-KINOKLUBO

La klubo organize stabiligis. La sekcioj foto, kino kaj magnetofono laboras aktive. Jam estas preta la 16 m. m. filmo „Bonan venon en Sofio“. La organiza komitato de la 48-a UK mendis tri kopiojn de la filmo, kiujn oni sendis por projekciado en eksterlando. La preparlaboroj por filmigo de la kongresoj en Vraca kaj Sofio komenciĝis. La magnetofona sekcio surbendigis kelkajn esperanto-programojn kaj kolektis dekon da gramofondiskoj. Ii estas je dispono de la societaj estraroj por utiligado kontraŭ pago de la faritaj elspezoj por ties pretigo kaj sendo.

La foto-sekcio komencis liveri al Esperanto-gazetoj fotojn. Ĝi respondecas pri la starigo de la foto-ekspozicio-konkurso dum la 48-a UK.

La agado de la klubo estas granda kaj multflanka kaj oni ne povas ĝin respeguli per deko da frazoj.

Nik. Nikolov

NOVAJ SOCIETOJ

Dum la forpasinta jaro CK de BEA konfirmis la jenajn [novajn] sociojn:

130. Vilaĝo Smolnica (Tolbuhina distr.) — „Progreso“.
131. Vilaĝo Ŝatrovo (Kjustendila distr.) — „Balkana Konkordo“.
132. Vilaĝo Panĉarevo (Kjustendila distr.) — „Razmetanica“.
133. Sofio, Fabriko por Malfortkurentaj Aparatoj — „48-a Univer-sala Kongreso“.

DUA PLENKUNSIDO DE LA CENTRA KOMITATO DE BEA

La 15-an de decembro en Sofio okazis plenkunsido de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio. Ĉeestis membroj de la Centra Komitato el la tuta lando, la membroj de la Estraro de Bulgara Esperanto-Junularo kaj pluraj membroj de la Estraroj de la sofiaj societoj, entute 62 gekamaradoj.

Raporton „La Oka Kongreso de BKP kaj la taskoj de BEA“ legis k-do Ĥr. Gorov — prezidanto de BEA. Informon pri la organiza stato de BEA legis k-do V. Oljanov — organiza sekretario de BEA, kaj informon pri la antaŭpreparoj por la 48-a UK de Esperanto en Sofio legis k-do At. Lakov — vicprezidanto de LKK.

En la diskutoj partoprenis: S. Ĥesapĉiev el Sofio, B. Drenski — St. Dimitrov, Iv. Vasilev — Pazarĝik, R. Triĉkov — Vraca, M. Momĉev — Ruse, As. Grig'rov — Sofio, Iv. Batakliev — Plovdiv, S. Simeonov — Sofio, N. Nikolov — Sofio, N. Pilev — Varna, prof. V. Peevski — Sofio, Ŝt. Kukuŝev — Peŝtera, Zdr. Velikov — Pleven, G. Dimov — Varna, Kr. Karucin — Sofio kaj P. Popnikolov — Sofio.

La plenkunsido akceptis rezolucion, kiun ni publikigas aparte.

La vasta pridiskuto de la gravaj antaŭstarantaj taskoj sendube donos novan impulson al plibonigo de la agado de la asocio.

REZOLUCIO

La plenkunsido de CK de BEA, okazinta je la 15-a de decembro 1962, pridiskutinte la raporton de la prezidanto de la asocio Ĥr. Gorov je temo: „La Oka Kongreso de Bulgara Komunista Partio kaj la taskoj de BEA“, la informon de la organiza sekretario V. Oljanov pri la organiza stato de la BEA kaj la informon de la prezidanto de LKK, N. Aleksiev, pri la preparlaboroj por la organizo de la 48-a Universala kongreso de Esperanto,

KONSTATAS:

La historiaj decidoj de la Oka Kongreso de Bulgara Komunista Partio kaj la entreprenoj, kiujn ĝi markis por la konstruado de la material-teknika bazo de la socialismo en nia lando kaj la laŭetapa transiro al la konstruado de la komunisma socio, inspiras kaj devigas la bulgarajn geesperantistojn kaj ilian asocion ankoraŭ pli aktive partopreni en la strebado de nia popolo por la efektivigo de ĉiuj iniciatoj de BKP, de la popola registaro kaj de la lokaj organoj por la akcelo de la disvolvigo de la landa ekonomio kaj kulturo.

En ligo kun tio estas nesesa ĉiufanka plibonigo de la laboro kaj la aktivecoj de la estraro de BEA, de la asocio, de la lokaj societoj kaj de ĉiuj bulgaraj geesperantistoj, en la spirito kaj surbaze de la grandioza programo, aprobita de la Oka Kongreso.

Malgraŭ ke ankaŭ ĝis nun per la plenumita ideologia kaj organiza laboro BEA edukis siajn membrojn kaj la bulgarajn geesperantistojn senĉese asimili la leninismajn principojn kaj rigore apliki la diversajn formojn kaj metodojn, kiujn disponigas al ili la internacia lingvo kaj la internacia Esperanto-movado

por konigi en eksterlando la grandegajn sukcesojn de nia lando en la regionoj de la socialisma konstruado, ekonomio, kulturo kaj nova vivmaniero de nia popolo, tiu ĉi laboro kaj aktiveco jam ne estas sufiĉa por respondi al la novaj kondiĉoj. Pro tio estas necesa serioza plibonigo kaj plivastigo de la kulturkleriga, ideologia kaj organiza laboro en ĉiuj sektoroj de nia enlanda movado, metante en la centron la bone organizitan kaj gvidatan internacian korespondadon. Krome, oni devas plibonigi la redaktadon kaj la teknikajn arangojn de „Bulgara Esperantisto“, por ke ĝi fariĝu efektiva organizanto de nia movado.

Urĝe necese estas, ke CK de BEA kaj la LKK por la 48-a UK pli intime laboru por organizo de vere modela kongreso. La laboro inter la junularo pliboniĝis, sed ĝi ne korespondas plene al la altaj celoj, kiujn la esperantista junularo devas aspiri en la kadroj de la enlanda movado.

Por la plibonigo de la asocia laboro la plenkunsido

DECIDAS:

1. Aprobas la prezentitajn raporton kaj informojn kaj la ĉiuf flankan laboron de la Estraro de CK de BEA dum la periodo ekde la 35-a kongreso ĝis la nuna plenkunsido.

2. Ĉefa laboro de la estraro de la CK de BEA, de la lokaj societoj kaj de ĉiuj bulgaraj geesperantistoj estu la plenumo de la decidoj kaj la direktivoj de la Oka Kongreso de BKP, subigante al ili ĉiujn poresperantajn kaj peresperantajn taskojn. En ligo kun tio la estraro de BEA planu la necesajn entreprenojn por urĝa kaj sistema plibonigo de la kulturkleriga, ideologia, etika kaj organiza laboro de la asocio. La estraro fiksu kaj preparu prelegojn pri la grandiozaj ekonomiaj perspektivoj de la direktivoj kaj la rolo de la esperantistoj; pri la ideologia laboro inter la geesperantistoj en la lumo de la decidoj de la Oka Kongreso tiurilate; pri la taskoj de la internacia korespondado.

3. Por la bona organizo kaj efektiva utiligo de la internacia korespondado (individa kaj kolektiva) la estraro organizu dum la printempo specialan plenkunsidon de CK de BEA pri la internacia korespondado. La raporton preparu komisiono en konsisto: Trajana Petkova, Tinka Lakova, Radoslav Triĉkov, M. Mekikĉiev, Ganĉo Ganĉev, Ŝterju Kukuŝev, Ĥr. Manolov, Petko Arnaudov, Ĥr. Dolĉinkov kaj Ĥr. Ĥristov.

4. La estraro de CK de BEA fiksu la necesajn entreprenojn por la organiza stabiligo kaj aktiveco de la lokaj societoj, por la plimultigo de la nombro de la asociaj membroj, por la regula kolektado kaj pagado de la membro-kaj abonkotizo, por aligo de pli granda nombro da bulgaraj geesperantistoj al la 48-a, por fondo de Esperanto-societoj en uzinoj kaj fabrikoj. La asocia organo „Bulgara Esperantisto“ devas esti ricevata kaj legata de ĉiu bulgara esperantisto. En tiuj kampanjoj estas devigataj partopreni ĉiuj membroj de CK el Sofio kaj la provinco.

5. La plenkunsido komisiis al la societoj en la urboj: Gabrovo, Târnovo, Sevlievo, Pleven, Levski, Sviŝtov, Asenovgrad kaj Sliven fondi junularajn grupojn. Ĉiuj societoj kaj junularaj grupoj akcentu al la kulturaj aktivecoj de la esperantista junularo en kunligo kun la antaŭstarantaj internaciaj kongresoj (19-a kongreso de TEJO kaj 48-a UK). La junulara sekcio de BEA planu iniciatojn por laboro inter la junularo dum 1963.

6. La plenkunsido devigas la societojn senprokraste ellabori konkretajn planojn por efektiveco de la kongresa rezolucio. Kopion oni sendu al la kancelario de CK ĝis fino de marto 1963.

7. La plenkunsido devigas la CK-anojn pli ofte vizitadi la societojn en sia distrikto por helpi al la organiza vivo kaj kulturkleriga agado.

8. La plenkunsido postulas de la societaj estraroj teni en ordo la protokollibron kaj sendi kopiojn de la protokoloj de la jarkunvenoĵoj en la kanceltaron de CK de BEA.

**DECIDO DE LA PLENKUNSIDO DE CK DE PEA PRI PLIMULTIGO
DE LA MEMBRARO DE LA ASOCIO KAJ PLIVIGLIGO
DE LA MALFORTAJ SOCIELOJ**

La 35-a kongreso en Burgas decidis pliigi la nombron de la membroj de BEA je 6000. Tio signifas, ke ni devas pligrandigi la nombron per 20%. Por plenumi bone tian gravan taskon ni devas havi planon.

1. Ĉar nun preskaŭ en ĉiu distrikto ni havas membrojn de CK, kiuj prizorgas la laboron de la societoj en la distrikto, kaj la societoj en la distriktaĵaj centroj plifortigis, la plenkunsido de CK difinis la planon laŭ distriktoj, nome:

Distr. de Blagoevgrad — 170 membroj, de Burgas 200, de Varna 300, Vidin 50, Vraca 210, Gabrovo 270, Pernik 90, Kolarovgrad 130, Kârĝali 60, Kjustendil 230, Loveĉ 210, Mihajlovgrad 280, Pazargik 220, Pleven 180, Plovdiv 560, Razgrad 120, Ruse 270. Silistra 15, Sliven 80, Smoljan 60, Sofia 1120, Stara Zagora 540, Tolbuhin 100, Târgovište 50, Târnovo 230, Haskovo 460, Jambol 210. La CK-anoj en la distriktoj kune kun reprezentantoj de la societoj distribuos tiujn ciferojn inter ĉiuj societoj.

La plenkunsido akceptis ankaŭ la planajn ciferojn de la plej grandaj societoj: Burgas „Nigra Maro“ 140, Varna „Albatro“ 260, Vraca „Sukceso“ 150, Gabrovo „Verda Torĉo“ 130, Sevlievo „Frateco“ 68, Kolarovgrad „Vekiĝo“ 120, Kujstendil „Flamo“ 60, Stanke Dimitrov „Marek“ 110, Loveĉ „Espero“ 80, Mihajlovgrad „Septembra gloro“ 200, Pazargik „Radio“ 110, Pleven „Eterna amikeco“ 110, Asenovgrad „David Sasonov“ 100, Karlovo „Levski“ 90, Plovdiv „Kulturo“ 300, Ruse „Libero“ 80, Ruse „Ponto de l' Amikeco“ 65, Sliven „Espero“ 45, Samokov „Rila Esperantisto“ 64, Sofia „M. Gorkij“ 720, Sofia „Vela Peeva“ 60, Sofia „Heroldo“ 100, Sofia „Prospero“ 120, Kazanlâk „Roza Valo“ 130, Stara Zagora „Verda Stelo“ 220, Tolbunin „Paco“ 70, Poski Trâmbeŝ „Progreso“ 40, Târnovo „Lumo“ 80, Dimitrovgrad „Flamo“ 110, Dimitrovgrad „Internacia Amikeco“ 90, Haskovo „Asen Zlatarov“ 90, Jambol „Maksim Gorkij“ 180.

2. Sed por povi plenumi la ĝeneralan planon ni devas vekti la dormantajn societojn. Tio devas esti konstanta zorgo de CK kaj precipe de CK-anoj en la distriktoj. Sed eble tio ne sufiĉas. La fortaj societoj devas akcepti sub sian patronecon la malviglajn societojn. La plenkunsido faras la jenan proponon:

Societo „S. Kalpazanov“ en Velingrad akceptu la patronecon al la societoj en Bansko kaj G. Delĉev, s-to „Nigra Maro“ en Burgas akceptu la patronecon al la societoj en Ajtos, Miĉurin, Pomorie, Sozopol, „Verda Torĉo“ en Gabrovo akceptu la patronecon al la societoj en Batoŝevo kaj Drjanovo, „M. Gorkij“ en Sofia — al la societoj en Botevgrad, Breznik kaj Buĥovo, „Rila Esperantisto“ en Samokov — al Govedarci, „Vekiĝo“ en Kolarovgrad — al Preslav, „Espero“ en Loveĉ — al Teteven, „Heroldo“ en Sofia al Bankja kaj Etropole,

„Septembra Gloro“ en Mihajlovgrad — al Berkovica, Vladimirovo kaj Leĥĉevo, „Sukceso“ en Vraca — al Belogradĉik, Kneja, Orjahovo, „Radio“ en Pazarĝik — al Batak, Panagjuriŝte, Septemvri, „Eterna Amikeco“ en Pleven — al Begleĵ kaj Pordim, „Kulturo“ en Plovdiv — al Belozem, Gara Kriĉim kaj Prolom, „Levski“ en Karlovo — al Gorni Domljan, Klisura, Rozino, „Progreso“ en Kubrat — al Sveŝtare kaj Iŝperih, „Ponto de l' Amikeco“ en Ruse — al Borovo kaj Dve Mogili, „Libero“ en Ruse — al Ŝtrâklevo kaj Silistra, „D. Sasonov“ en Asenovgrad — al Madan, „Roza Valo“ en Kazanlak — al Gabarevo, Taĵa, Maĝlij, Haĝi Dimitrovo, Ŝipka, Gorno Saĥrane, „Verda Stelo“ en Stara Zagora — al Vetren, Dâlboki, Trojanovo, „Lumo“ en Târnovo — al Gara Gorna Orjahovica kaj urbo G. Orjahovica, „Progreso“ en P. Trâmbeŝ — al Radanovo, „M. Gorkij“ en Jambol — al Elhovo kaj Zimnica. Bone estus se la societoj-patronoj laŭ antaŭa interkonsento farus viziton al la subpatronecaj societoj kaj akceptus la patronecon per ia solenaĵo. Tio certe helpos pri la plivigligo de la dormantaj societoj. Kompreneble, post tio estos necesa konstanta zorgo kaj helpo fare de la patrono, per reciprokaj vizitoj, ekskursoj, regionaj konferencoj, korespondado k. a.

SALUTO AL LA ESPERANTISTARO DESUR KILIMANĜARO

La 2-an de novembro 1952 mi rememoris la esperantistaron. Tio estas nenio stranga — mi ja dediĉis multajn pensojn kaj agojn dum la lastaj 33 jaroj al la ideo de la Internacia Lingvo. Sed tiun matenon, post kvar tagoj de intensaj klopodoj, la „Karavano de Amikeco tra Afriko“ atingis la supron de la neĝkovrita Kilimanĝaro (6.000 m.), la plej alta monto de la Afrika kontinento. Kaj en tiu emocia momento, spiregante kiel lokomotivo kaj kun forte bateganta koro (ĉefe pro la alteco, kompreneble!), mi decidiis sendi tiun ĉi saluton al la viroj kaj virinoj en la tuta mondo, kiuj kredas, kiel mi, ke komuna lingvo povas kontribui al la tut-homa interkompreniĝo, kaj ke tiu lingvo estas Esperanto.

Kune kun la aliaj kvar membroj de la Karavano de Amikeco, mi kisís la verdstelan flagon sur la „tegmento de Afriko“, kiel antaŭ 18 jaroj mi faris tion sur la pinto de Akonkagvo.

Kaj pere de la flirtado de la flageto, tiu ĉi saluto flugu al la kvin kontinentoj!

Tibor Sekelj

MONTODOMO „ESPERANTO“

Novajn kontribuojn al la fonduso:

Esperanto-societo, u. Tallin, USSR 50 lv.

Nikola Nikolov, Sofia 40 lv.

Ŝterju Kukuŝev, Peŝtera 5 lv.

Esperanto-societo „Marek“, Stanke Dimitrov 5 lv.

Ivan Iliev, Sofio 2 lv.

Al ĉiuj koran dankon!

Nova fondinto de la montodomo — Esperanto-societo en urbo Tallin, USSR.

De tempo al tempo precipe el eksterlando oni sendas Esperanto-librojn por la starigota en la montodomo biblioteko. Ĉion oni sendu nur al la adreso de la sekcio: p. k. 44, Sofia.

Turista sekcio „Esperanto“

S O N E T O J

1

Al via portreto

Okuloj tristaj, lipoj kunpremitaj,
aspekt' de ofendita knabino —
al mi vi tia ŝajnas sur portret'
(ĉu miaj pensoj estas ne malspritaĵ?).

Mi amas vin kun ardo, kun impet'!
Post jaroj izolecaj, eĉ ermitaj,
nun miaj tagoj estas lumigitaj
per via lumo, kara Poliet'!

Vin ĉirkaŭpreni volus mi avide,
mi revas pri renkonto vid-al-vide,
sed ĉu okazos tiu ĉi renkont'?

Ho, malfermiĝu pordoj por poeto! —
ĉar „se ne iras mont' al Mahometo,
mem Mahomet' direktas sin al mont'...“

1958.

2

Enŝorĉita rondo

Mi ĝojas, ke mi ree vin inspiris
per mia vers' al bela versrespond'! —
Ĝi min atingis kiel freŝa ond',
en mian koron raven ĝi enspiris.

Vi scias ja (mi tion ofte diris),
ke vi por mi nun estas tuta mondo,
ke via amo — enŝorĉita rond',
en kiun mi kun arda kor' eniris!

El tiu rond' elŝiros min nur mort',
ĉar estas ĝi donac' de bona sort',
en fin' de vivo hele ekbrilinta!

Sed estas ĝi nur dolĉa iluzi'
kreaĵo de poeta fantazi',
en ĝi — elir' el nokto labirinta!

1958

BALADO PRI LA MORTIGITA KANTO

Mi havis kamaradon. Suferante
li mortis sen perfid' al ni.
Kontente tion ĉi mi verkis kanton —
sen fino malĝojegis mi.

Se i saman nokton du polic-agentoj
ekfrapis porde pro malam' ...
Freneza tim' min kaptis por momento,
paperon ĵetis mi en flam'.

Multkoste malfortec' al mi venĝita.
Pri kio vervis mia kor' ?
Jam ĉiutage kanton forbrulitan
mi penis skribi laŭ memor'!

Malĝoj' al kamarado pli doloris,
ĝi estis bruleganta vund' —
kaj ĉiu verso mian kapon foris
naŭzita de mi el profund'.

La kamaradon malamik' mortigis,
farigis ties li viktim' —
samtiel kanton mia man' nuligis!
Ĉis kie min venigis tim'!

Elaĉetigas la eraroj lukte.
Ho, se mi min oferos mem
la kulpon ĉu almenaŭ mi reduktos
al mia murdita poem'?

Tradukis Canko Murgin

MEDITO POST NOVA JARO

Nova jaro — nova viv',
logas bela perspektiv';
hom' travagis la ĉielon —
baldaŭ li vizitos stelojn.

Ven', triumfo de l' scienco —
perdas religi' potencon,
kaj levigos homkulturo
ŝanĝas sin socistrukturo.

Liberiĝas subpremitoj,
ne plu estu fi-militoj...

Do, batalu ni senĉese
por la paco, por progreso,
ke sur tacio de la tero
ne plu estu hom-mizero.

Nova jaro — nova viv'
logas bela perspektiv'...

Toma Ajolov
Plevdiv



23-an de decembro Esperanto-societo „Albatro“ en Varna celebris la 50-jaran Esperanto-agadon de la meritplena esperantistino Zora Mladenova-Hans. Malgraŭ la glaciiganta neĝventego en aŭditorio 20 de Supera Ekonomia Instituto „D. Blagoev“ kunvenis 85 geesperantistoj kaj estimantoj de la kara jubileantino.

Georgi Dimov, prezidanto de la societo „Albatro“, tralegis raporton pri ŝia duonjarcenta poresperanta agado. Li emfazis ŝian ĉiuf flankan interesiĝon kaj ĉefe ŝian konsiderindan kontribuon al la Esperanto-movado, per kiu ŝi meritis la nomon „Esperantista Patrino“.

Post tio sekvis gratuloj kaj donacoj. En la nomo de CK de BEA parolis Violin Oljanov. Li figure revivigis kelkajn okazintaĵojn el la agado de la jubileantino, kiuj efikis tre kortuŝe. K-do Oljanov tralegis gratuleteron de CK de BEA kaj donis al Zora Hans belan donacon.

En la nomo de la Fervojista Sekcio ĉe BEA gratulis la jubileantinon membro de CK de BEA M. Mekikĉev.

Dimitr Dimov, vicprezidanto de „Albatro“, kiu prezidis la kunvenon, en la nomo de la societo gratulis la jubileantinon kaj tralegis la decidon de la Estraro de „Albatro“, ke Zora Hans estas nomita **„Honora Prezidantino de „Albatro“**. Li tralegis ankaŭ speciale preparitan adreson al Zora Hans, kiu estas enskribita en la „Oran Libron“ de „Albatro“.

En la nomo de junulara sekcio „Verda Lumturo“ ĉe „Albatro“ parolis A. Kerkin. Li esprimis sian admiron pri la senlaca kaj sindona laboro de Zora Hans, kaj bondeziris al ŝi longan kaj feliĉan vivon.

En la nomo de la studenta grupo „Studenta Amikeco“ ĉe Supera Ekonomia Instituto gratulis la jubileantinon Nikola Pilev.



La juna pionirino Polja Kostova en la nomo de junpionira taĉmento „D-ro Zamenhof“ en lernejo „Haĝi Dimitr“ gratulis esperantlingve la Esperantistan Patrino.

Kelkaj junpioniroj el lernejo „D. Kondov“, kie longan tempon instruis Zora Hans, gratulis ŝin en la nomo de la instruistaro kaj la pionira organizaĵo.

Salutis la jubileantinon ankaŭ Cv. Jolov, G. Dimov, M. Apostolova. Estis donitaj multaj floroj kaj donacoj.

Estis ricevitaj multaj gratuleteroj el diversaj landoj kaj el Bulgario, kiuj estis ekspoziciitaj.

Kortuŝaj momentoj!

Al ĉiuj la kara „Patrino“ respondis per trafaj kaj saĝaj vortoj. En la fino ŝi diris: „Sub du steloj mi pasigis kaj pasigos mian vivon — ili estas la ruĝa kaj la verda“.

La solenaĵo finiĝis per literatur-muzika programo.

Nikola Pilev

Al k-dino Zora Mladenova-Hans
str. L. Karavelov 79
VARNA

Karega kamaradino Hans,

Ni sendas al vi niajn pej varmajn gratulojn pro via rimarkinda jubileo de 50-jara modela aĝado en la Esperanto-movado kaj niajn sincerajn bondezirojn pri sano, longa kaj feliĉa vivo kaj daŭra fruktodona laboro por nia kara movado.

Ja vi dediĉis vian tutan konscian vivon al la homara idealo pri paco kaj interpopola fratigo, pro kio vi ekportis ekde frua aĝo la verdan torĉon kaj 50 jarojn jam vi ne ellasis ĝin eĉ por momento, malgraŭ la ŝtormoj de la faŝista obskureco.

Jam 14-jara knabino vi aliĝis al la Esperanto-movado dum 1912. Dum longaj jaroj vi estis gvidantino de la Esperantista societo „Albatro“ en Varna, ĉu kiel prezidantino, vicprezidantino, aŭ sekretario, ĉu kiel membro de la Estraro. Vi kunlaboris al diversaj Esperantaj eldonaĵoj, gvidis multajn kursojn, propagandis senĉese kaj senlace kaj varbis centojn da adeptoj de la Zamenhofa lingvo. Nehazarde vi gajnis la honorplenan nomon „Esperantista Patrino“.

Vi havas la plenan rajton nun ĝui la abundajn fruktojn de viaj multjaraj klopodoj.

Fartu bone, karega kaj aliestimata k-dino Hans, kaj daŭre portu alte a verdan torĉon de la Esperanto-movado!

Sofio,

la 20-an de decembro 1962

Estraro
de la Centra Komitato
de Bulgara Esperantista Asocio.

JUNULARO SUR POSTENO

IV TUTLANDA ESPERANTISTA JUNULARA BALO-FESTIVALO

En sia lasta kunsido, la Estraro de BEJ vaste diskutis pri la loko, dato kaj precipe pri la karaktero de la IV TEJB. Estis decidite organizi la balon en Varna, la 11—12-an de majo 1963, kiel festivalon de la artaj programoj, kiujn la junularaj grupoj el la tuta lando intencas prezenti dum la Kongreso de TEJO en Vraca. Sekve, krom la kutima junulara balo en la sabata vespero, la aranĝo ampleksos ankaŭ unu aŭ du koncertojn de junularaj grupoj kaj unuopaj amatoraj artistoj. La konkurado inter la partoprenantaj grupetoj kaj unuopaj junuloj ebligas la premiigon de la plej bonaj kaj la elekton kaj kompilon de unu vere inda bulgara kultura programo por Vraca.

Nun la tasko estas prepari la avangardulan taĉmenton de la bulgara esperantista junularo, kiu portos sur siaj ŝultroj la antaŭpreparon kaj la praktikan organizon de la kongreso. Pro tio, ĉi jare, la celo de la balo estas ne la amasa partopreno de novaj kursanoj kaj amikoj de Esperanto, sed la kolekto de la plei bonaj fortoj de BEJ por lasta provo antaŭ la grava internacia aranĝo. La junularaj grupoj kaj societaj estraroj estas petataj havi antaŭvide tiujn rekomendojn ĉe la planado de sia partopreno en la Balo-Festivalo en Varna.

La kotizo por partopreno estas 2. lv. kaj inkluzivas ĉiun arangon kaj koncerton kaj unu tranoktadon. Limaĝo — 30 jaroj. Detalajn informojn en la venonta numero de „Bulgara Esperantisto“ kaj rekte de la organiza komitato, VARNA, p. k. 11.

KUNSIDO DE LA ESTRARO DE BULGARA ESPERANTO-JUNULARO

La 15-an de dec. 1962 en Sofio okazis la unua plenkunveno de la Estraro de BEJ post la kongreso en Burgas. Ĉeestis ĉiuj estraranoj, nome: S. Simeonov, E. Keremidĉiev, Al. Dimitrov kaj Anna Pranova el Sofio, M. Momĉev — Ruse, J. Angelov — Plovdiv, N. Pilev — Varna, E. Daskalov — Vraca kaj St. Markova — Gabrovo. La Estraro traktis sinsekve la jenajn demandojn:

1) Partopreno de bulgaraj esperantistoj en la VIII Junulara Festivalo en Helsinki —

raportis: Al. Dimitrov.

2) La 18-a Kongreso de TEJO en Ystad kaj ĝiaj decidoj —

raportis: E. Keremidĉiev.

3) Stato de la antaŭprearoj por la 19-a Kongreso de TEJO en Vraca —

raportis: S. Simeonov.

4) Plano por la agado de BEJ dum 1963, konsidere al la kampanjo „Jaro de la junularo“.

5) Diversaj.

La Estraro aprobis la agadon de la reprezentantoj de BEJ partoprenintaj internaciajn junularajn arangojn dum 1962. Oni interŝanĝis ideojn pri la ĉefaj taskoj de la Estraro kaj de la lokaj junularaj grupoj lige kun la kongreso kaj la kampanjo „Jaro de la junularo“. Oni aprobis planon por la agado de BEJ (ni publikigos ĝin aparte). La Estraro decidis, ke la IV-a Tutlanda Esp. Junulara Balo-Festivalo okazu la 11-12. V. 1963 en Varna, kiel festivalo de la kongresprogramoj de la diversaj junularaj grupoj. Oni decidis organizi dum la sama arango la naciajn oratoran konkurson, kies gajnintoj partoprenu la konkursojn dum la internaciaj kongresoj en Vraca kaj Sofio.

LA JUNULOJ EN ĤASKOVO ARANĜIS ESPERANTO-EKSPOZICION

Laŭ iniciato de la junulara grupo ĉe Esp. socio „Asen Zlatarov“ en Ĥaskovo estis malfermita Esperanto-ekspozicio en klubejo sur la ĉefa strato. Ĝi celis montri al la publiko la sukcesojn de la Esp.-movado en nia lando kaj en la mondo. Estis ekspoziciitaj multaj libroj, gazetoj kaj aliaj eldonaĵoj. Aparta stando respegulis la evoluon de la movado en Ĥaskovo ekde 1903, kiam laŭ iniciato de Vasil Vaĉev Tenĉev estis fondita la unua socio en la urbo-„Radio“, kiu aktivis ĝis 1918. Denove ĝi reviviĝis dum 1923. Ekspoziciitaj estis libroj, manuskriptoj kaj leteroj de unu el la plej malnovaj esperantistoj en la urbo kaj la lando — Kr. Sivriev.

Kun pli ol 240 geko-espondantoj el 36 landoj kontaktas la Ĥaskovaj esperantistoj. En

multaj landoj nun oni scias pri la aroma tabako, kiu vegetas en la regiono, pri la socialismaj ŝanĝoj en nia vilaĝo. Nur malgranda parto de tiu korespondado estis montrita sur belaj tabuloj.

Dum nur unu semajno la ekspozicio estis vizitita de pli ol 4000 vizitantoj. Nun en Ĥaskovo oni scias iom pli pri la senco kaj taskoj de la Esperanto-movado.

Boris Kolev
Prezidanto de la JG

MULTNOMBRA JUNULARA GRUPO EN MIĤAJLOVGRAD

En la ekonomia lernejo en MiĤajlovgrad funkcias 11 kursoj kun pli ol 200 gekursanoj. La triono de la tuta lernantaro lernas la internacian lin' von. La kursojn gvidas As. Penkov — instruisto kaj la lernantinoj V. Joĉeva, S. Marinova kaj Olga Ĥristova. La 25. IX

okazis ĝenerala kunveno de la societo „Septembra Glo“ kun riĉa programo de kantoj kaj deklamaĵoj. Parolis ankaŭ k-do V. Oljanov — sekretario de BEA. La kunveno decidis fondi junularan grupon. Oni akceptis laborpilon kaj oni elektis estraron.

La lernantoj abonis multajn Esp-gazetojn, ekz. „Bulgara Esperantisto“n abonis 70 gejunuloj. La loka ĵurnalo presis artikolon de la lernantino V. Ivanova — „Gejunuloj, elenu la internacian lingvon Esperanto“ kaj la radio disaŭdigis paroladon de k-do Penkov: „Esperanto — mirinda fenestro al la mondo“
Veska Ivanova

EN PLOVDIV LA JUNULARO AKTIVAS

Lastatempe la juna esperantistaro rapide kreskas. Tamen ĝenerale la posedo de la lingvo ne estas bilda. Celante plibonigi la lingvoscion de la gejunuloj ĉe ni jam duan jaron funkcias la t. n. „parolgrupo“, kiu kunvenas regule ĉiuvendrede unu horon. Oni konversacias; oni klarigas gramatikajn regulojn kaj specialajn esprimojn; ofte oni kantas kaj deklamas. La bonaj rezultoj grandparte ŝuldiĝas al la juna gvidanto At. Krumov.

Karaj gejunuloj el la tuta lando, nur sciante bone kaj korekte la lingvon ni povos plensukcese partopreni la antaŭstarantan internacian junularan kongreson en Vraca.

Jordan Angelov
Estraro de BEJ

KONKURADO INTER GELEARNANTOJ

Nia societo „V. Levski“ en Karlovo kunĝo observas la konkuradon inter la du junularaj grupoj en la lernejoj „Hr. Botev“ kaj „V. Levski“. La grupoj estas gvidataj de lernantaj estraroj. La unua kun prezidanto K. Uzunov nombras 24 gelearnantojn kaj la alia kun prezidantino N. Ivanova — 32 lernantinojn. Ili kune akceptis kontrakton pri konkurado kaj promesis finligni Esperanton ĝis la somero de 1963. Ambaŭ grupoj de tempo al tempo organizas komunajn aranĝojn. Ekzemple okaze de la datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof ili preparis artan murgazeton kaj pentris lian portreton. La gelearnantoj penumis specialan programon antaŭ la loka radio-servo kaj ankaŭ en la societa klubo. Nun oni pretigas ekspozicion. La torĉon de la korespondado tenas N. Ivanova, kiu ekde la pasinta jaro korespondas kun pli ol 20 korespondantoj.

La lernejoj estas bona kampo por esperanta agado kaj nia societo rigardas ĝin kun plej granda atento kaj kontento.

Cv. Cvetkov



Esperanto-studrondeto en vil. Polski Trámbeš

MIA UNUA LETERO

Dekdua Leciono

Jen kiel tekstas mia unua esperanta letero:

Sofia, la 11-an de marto 1952.

Al S-ro Christian Petersen

Kopenhago

Bangestgade 20- IV.

Estimata Samideano,

Mi estas nova esperantisto kaj mi havas grandan deziron eniri r latojn kun sami'eano el aliaj landoj. Vian adreson mi ricevis de mia instruisto de Esperanto. Mi anko aŭ ne atingis tian perfek econ en la lingvo, kian mi dezirus, kaj mi timas, ke eble vi trovos iujn erarojn aŭ neperfektaĵojn en mia skribaĵo. Sed mi esperas, ke vi ne taksos tre severe mian unuan leteron kaj ke iom post iom en la plua korespondado miaj leteroj pl boniĝos lingve.

K lkaj vortoj pri mi mem: mi estas 25-jara, laŭ nacieco bulgaro, studento de juro ĉe la Sofia universitato. Esperanton mi komencis lerni antaŭ du monatoj kaj duono en vespera kurso. La lingvo ŝajnas al mi tre facila kaj mi rapide lernas ĝin. En junio ja oni facile lernas kaj memoras. Sed ne estas nur la facileco, kiu altiras min al Esperanto. Mi trovas en ĝi ion pli: belsonecon, logikecon, riĉecon, kaj super ĉo — ĝian noban ideon: internacia kaj interhomamikeco kaj solidareco. Mi deziras tutkore partopreni la vivon de la esperantistoj de la tuta mondo.

Delonge mi havas apartan intereson pri via lando. Mi jam havis eblecon akiri informojn pri ĝi per kelkaj l gaoj, sed restas ankoraŭ multe, pri kio mi dezirus scii detale. Mi ja ne povas atendi, ke unu sola persono skribus kun egala kompenteco pri ĉiaj temoj. Sed mi kredas, ke mi akirus sufiĉe ĝustan bildon de la vivo en via lando.

Vi aparte skribu al mi, kio speciale interesis vin pri la bulgara lando kaj popolo. Donu al mi demandojn, al kiuj mi penas respondi laŭ mia povo kaj scio.

Mi esperas, ke ni fariĝs bonaj amikoj, ĉu ne?

Mia adreso estas: Anton Andreev, Sofia, Str. Ĥristo Botev, 33.

Kun samideana saluto

A. Andreev.

SUFIKSOJ

Aĵ — io (ordinare konkreta objekto): a) kiu havas la kvaliton, kiun esprimas la radiko; b) kiu estas rezulto de la faro, kiun esprimas la radiko; c) kiu estas el la materio, kiun esprimas la radiko.

nov-ĵo — io nova. Mi diros al vi novaĵon = mi diros al vi ion novan.

malpur-ĵo — io malpura. Ĵetu tiun malpuraĵon!

skrib-ĵo — tio, kion oni skribas.

l gao — tio, kion oni legas (aŭ povas legi).

konstruaĵo — tio, kion oni konstruas (aŭ konstruis).

vi-ĵo — tio, kion oni vias.

mang-ĵo.

suker-ĵo — io el sukero.

viandaĵo — mang-ĵo el viando.

legomaĵo.

Aĵo = io, objekto, afero. Ĥie ni vidis multajn aĵojn.

EC — montras la kvaliton aŭ la staton, a eston, kiujn esprimas la radiko:

boneco — kv lito bon (de la bonaj homoj, de la bonaj aĵoj).

beleco — kvalito de la belaj aĵoj.

alteco — kvalito de la altaj objektoj.

juneco — kvalito de junaj homoj, stato, esto de junaj homoj.

En mia infaneco = kiam mi estis infano, en mia infana aĝo.
 La noveco de tiu vesto estas duba.
 La alteco de tiu ĉi altaĵo estas tre granda.
 Li faris al mi valoran donacon; lia gesto estas amikaĵo; per ĝi li esprimis al mi
 sian amikecon.
 Eco = kvalito. Li havas bonajn ecojn.

NOTINDAJ VORTUZOJ

teksti = havi tekston, esti kun teksto.
 miaparte (miaflanke) = de mia parto, de mia flanko.

EKZERCOJ

1. Io verda estas . . .
 La supra parto de la lago estas ĝia . . .
 Aĝo de infano estas . . .
 La kvalito de verda objekto estas . . .
2. Kion oni manĝas estas manĝo . . ., kion oni trinkas estas trinko . . .
 En tiu loko de la rivero estas granda profund. . . La profund. . . de la rivero en tiu
 loko estas tre granda.
 Lia parolas stult. . . Lia stult. . . estas proverba.
 Kion ŝi parolas estas pura naiv. . . Mi konas ŝian grandan naiv. . .
 Li rakontis pri siaj traviv. . . de la junaj jaroj.
 Mi sentas la freŝ. . . de la aero.
 La bel. . . de la naturo altiras min ekster la urbo.
 En mia infan. . . mi loĝis en malgranda vilaĝo apud la maro.
 Vidu kian blank. . . kaj pur. . . havas la neĝo en tiu ĉi loko.

NI REGENZÁS

K I E N N I I R A S ?

(Pri „Tragedio en la Universo“)

Eble, ĝi sonas kiel paradokso: en la esperanta literaturo tute mankas originalaj artaj verkoj pri la porpoca batalado. Tial ni kun intereso prenis en la manojn la rakonton „Tragedio en la Universo“, verkitan de la kolektivo de ĵugoslavaj astronomoj kaj tradukitan de konata esperanta literaturisto Ivo Rotkvič. La intereson ankoraŭ pligrandigis la cirkonstanco, ke la libro estas verkita en la formo de science-fantazia novelo, kio estas ankoraŭ pli nevidata en la esperanta literaturo.

En sia libro la aŭtoroj traktas la demandon pri la minaco de atoma kaj nuklea milito kaj pri ties eblaj sekvoj. La fantazia enhavo permesas al la aŭtoroj penetri al la estonteco de la surtera vivo kaj trakti la demandon de la vidpunkto de la estonta homaro kaj eĉ de la supozata vidpunkto de la loĝantoj de la planeda sistemo, ĉirkaŭanta la stelon Alfa el la konstelacio Centaŭro.

Tiamaniere la aŭtoroj penis serioze trakti la grandan evoluon de la scienco kaj analizi tiun konflikton inter la homa sorto kaj scienco — la konflikton, kiu tuj ekestos, se la fruktoj de la progresema scienco, kiuj laŭ la ideo devas malfermi novajn perspektivojn por la sentlima feliĉo de la homaro, trafos en la malindajn manojn.

La nuntempaj okcidentaj aŭtoroj preferas en siaj science-fantaziaj verkoj desegni senlimajn bildojn de la estonteco, penetritajn de senlira pesimismo. Precipe senesperiga farigis tiu ĉi literaturo post la atomaj eksplodoj en Hiroŝima kaj Nagazaki.

Tiuj trajtoj estas sentataj ankaŭ en la recenzata libro: ĝi prezentas teruregajn bildojn de la postsekvaj de la nuklea milito kaj de la regado de homoj, kiuj troviĝas laŭ la esprimo de H. G. Wells (Uelz) „ĉe la ekstremo de siaj fortoj“ kaj tial perdas neeviteble la aspekton de homo. Multaj paĝoj de la libro estas timigaj kaj, ni diru malkaŝe, tro pesimismaj. La aŭtoroj asertas, ke la homoj de la XX jarcento estas okupitaj nur pri siaj personaj aferoj, ofte malgustaj kaj senencaj, kaj tute ne interesiĝas pri sia estonta sorto. La potenca pacmovado de la aŭtoroj tute ne tuŝas, kvazaŭ ĝi ne ekzistas. Eble ĉi tiu movado nun ankoraŭ ne estas tiom aŭtoritata, kiel ĝi devus esti, tamen ĝi ekzistas kaj ne pentri almenaŭ unu reprezentanton de tiu ĉi movado en tia libro estas ne ĝuste. Ofte tragikita en la teksto ankaŭ la influo de la okcidenta milita propagando — nome, la tendenco prezenti la aferon tiel, kvazaŭ sur la tero



ekzistas du landoj—atakuloj, en egale agresemaĵaj tendaroj. Ĝi estas peko kontraŭ realismo. Ĝa efektive nur unu tendaro — tiu de Usono estas imperiisma, agresema, dum la tendaro de la socialisma landoj, ĉefe runde de USSR, estas vere pacema, sed nur devigata disvolvi la militan produktadon por sin defendi de ebla atako de la kontraŭa imperiisma tendaro.

Malgraŭ tiuj ĉi ŝajnoj mankoj la libreto tamen povus esti utila por la esperantistoj-pac batalantoj, se ĝi estus lingve korekta. Tamen la lingvo de la libro estas tia, ni diru, neordinara, ke ĝi postulas specialan priparolon.

Ĝenerale, en la esparta literaturo ekzistas du tendencoj. Unu strebas enkonduki kiel eble plej multe da novaj radikoj por (laŭ onia opinio) plifaciligi la „tujan kompreneblecon“ de la lingvo. La alia tendenco, klare esprimita en la recenzata libreto, strebas plimultigi la kvanton de derivaĵoj por mobilizi la „internajn fortojn“ de la esperanta leksiko kaj montri, ke el la ne tro granda kvanto da radikoj oni povas fari multajn novajn vortojn. La tendenco mem estas ne malbona, se nur ĝi estas aplikata en la kadroj de la Zamenhofa vortfarado. Ni volas per tio diri, ke ĉiu vorto devas esti klara kaj komprenebla (ŝajnas, ke ni postulas ne tro multe).

Sed, ho ve, la plej multo de la derivaĵoj en la libro estas ne klaraj. Ni citu kelkajn el ili:

diskarnemaj sovaĝbestoj (=rabobes'oj? (p. 39)

kuntuŝa ĉambro = (najbara)? (p. 51)

areto da kanib'oj fortienis (= penetris tien malproksime) (p. 24)

Nun suras la angulo (p. 28)

. . . praeksa socio (p. 44)

Mian memoron trasubitas la vortoj (p. 45)

. . . ladnutraĵo (p. 59) — ĉu ia nutraĵo el lado? Verŝajne temas pri konservajo . . .

dirĵuso (=jus dirto?) (p. 67)

foresceptigi (p. 59) . . . dialaŭtigi (p. 88) . . . elvizito (91)

Tiaj ekzemploj ŝvamas en ĉiu alineo.

La tradukinto do deziras atenti la principon de „neceso kaj sufiĉo“: ekzemple, ĉu necesas la prefikso „Al“ en la sekvantaj vortoj: altrovo (p. 11), alrigardu (p. p. 30, 73, 84, 92), aldemandi (p. 25), alelektos (p. 86), alatingi (p. p. 25, 48). Ĉu ne klaraj estus pli simplaj vortoj: trovu, rigardu, atingi, demandas, elektos?

Ĉu estas klara la esprimo: „Alrigarde el la interplaneda perspektivo?“ (p. 24)

La prefikso „al“ estas ofte uzata senbezono kaj erare:

alĝisi (=atingi, p. 14), alsubiti (=trafi, p. p. 38, 61)

alsanci (=atingi, prosperi, p. p. 63, 67)

La samon oni povas diri pri „en“, kiu estas tute nenecesa en la vortoj: enefikas (=efikas, p. 43), enŝtonigis en teruro anstataŭ ŝtonigis pro teruro“ (p. 39).

Ni ne komprenas la senmonbran uzadon de la prefikso „el“ — tie, kie ĝi estas nenecesa, aŭ superflua. Ĉu oni ne povas kompreni la vortojn: „verkinte la libron“, „atoma energio“, „radiado“, „ni ĝuos la freŝan aeron“, „la Universo naskis la homon“, „defendi“, sed oni nepre devas uzi „Elverkinte la libron“, (p. 9), „elatoma energio“ (p. 54), „elradiado“ (p. p. 57, 58), „ni elĝuos“ . . . la freŝan aeron“ (p. 58), „la Universo elnaskis la homon“ (p. 82), „eldefendi“ (p. 85). Eraraj estas la esprimoj: „nia libro estos elirinta“ (p. 207 — devas esti „aperinta“), „eloorloiti“ (p. 25 = devas esti „bredi“), „de ili ni ankaŭ eloriginis“ (p. 33, devas esti „devenis“, „elludis la . . . rolon“ (p. 43), „elturetas“ (p. 49), „elvo o“ anstataŭ „eliro“ (p. p. 60, 87) (verŝajne de la germana „Ausweg“), „elgermis“ . . . fungoj“ (p. 84) anstataŭ „ekgermis“.

Same eraraj estas la esprimoj: „kio okazos pri mi“, anstataŭ „kio okazos al mi“ (p. 56), „vi primemoras“ (p. 81), „Ekentuzasmo“ (p. 56), „morgaŭ ekmatene“ (p. 57), „jame“ (p. 74), „subjugigi“ (p. 41) anstataŭ „subjugi“, „dozlimo“, anstataŭ „limdozo“, „forŝnurataj“ (p. 26), en la senco „gvidataj, kondukataj“, „ekproksimumas“ (p. 54) kaj aliaj.

Jes, Zamenhof postulis al ni multegon da materialo por fruktodona vortfarado, sed ne por senfrukta eksperimentado, kiu povas nur malpurigi nian vortaron per vortoj-forbailindaĵaj.

Kun miro ni legis sur la p. 94 „En multegaj lernejoj la instruistoj legas al la legantoj kiel modelan literaturon la „Tragedio en la Universo“ . . . se ĝi ne estas elpensado de la tradukinto, ni povas nur kompati la lernantojn, kiuj en la komenco de sia lernado alproprigas al si kripligitan lingvaĵon.

La aŭtoroj skribas pri pensantaj estaĵoj de la planada sistemo de Alfa de Centaŭro, kiuj post multaj miloj da jaroj venos al la Tero kaj de la relikvaj presaĵoj ekscios pri la katastrofo, kiu okazis sur la Tero.

Ni rovas dubi, ĉu ili ion tiam komprenos, se ni — la samtempuloj de la aŭtoroj ofte ne komprenas la lingvon de ilia verko.

Oni povas verŝajne demandi: ĉu valoras okupi sin pri lingvaj subtilaĵoj dum la tempo, kiam sur la Tero ekzistas tia danĝera minaco por la homaro?

Sed ni estas pli optimismaj, ol la aŭtoroj de la recenzata libro. Ni scias, ke la homoj de la XX jarcento estas ne tiom frivolaĵ kiel ilin imagis al si la aŭtoroj — kaj ni estas certaj, ke la persista volo de la tuta progresema popolo en la paca laboro estas pli forta ol la nuklea armilo.

A. Koh, N. Stejnberg

(Pollando)

STUDENTA VIVO EN SOFIO

TRA LA GAZETARO

En ĵurnalo „Septemvrijsko slovo“ en urbo Mihajlovgrad (24. XI. 1962) aperis artikolo „Junuloj, lernu la internacian lingvon Esperanto“ de V. Krăsteva, lernantino en III „a“ kurso ĉe la ekonomia teknikumo en Mihajlovgrad.

La artikolo estas tre interesa kaj en ĝi la aŭtorino rakontas pri la ekskurso en Pollando, Hungario kaj Jugoslavio.

En la sama ĵurnalo (8. XII. 1962) — artikolo en la rubriko „Kultura taglibro“ de la sama lernantino titolita „Se ĉiuj homoj...“ — verŝajne rakorto pri la esperantaj kursoj en Mihajlovgrad.

En ĵurnalo „Rabotniĉesko delo“ en Sofio (19. XII. 1962) — informo pri la Plenkunsido de CK de Bulgara Esperantista Asocio, okazinta en Sofio la 15-an de decembro 1962.

La 11. XII. 1962 la sofia studenta Esperanto-societo „V. Peeva“ okazigis sian jar-kunvenon. La ĉeestantaj membroj aŭdis la raportojn de la estraro kaj de la kontrola komisiono. La societo de la sofiaj studentoj-esperantistoj ekzistas jam duan jaron. Kun ĝojo oni konstatis, ke de jaro al jaro la movado gajnas pli da adeptoj kaj la intereso al la regule organizataj studentaj kursoj konstante kreskas. Oni interŝanĝis opiniojn kiel forigi la erarojn kaj mankojn en la organiza vivo, kion oni devas plani por la lingva perfektigo. Tiu lasta demando estas tre grava speciale nun antaŭ la kongresoj en Vraca kaj Sofio.

Unuanime estis elektita la novaj gvidorganoj — la Estraro kaj la Kontrola komisiono. Ĝin eniris novaj entuziasmaj membroj de la societo. La kunveno akceptis ankaŭ rezolucion, en kiu oni fiksas la antaŭstarantajn taskojn en la ideologia, eduka, kulturkleriga kaj organiza laboro.

Sveĵa Vâlova

Bulgaraj esperantistoj, ĉu vi jam aliĝis al la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio? Ĝis la 20-a de januaro 1963 jam aliĝis 475 bulgaraj kaj 1105 fremdlandaj esperantistoj, entute 1580 personoj el 34 landoj.

Aliĝu senprokraste al la Kongreso!

DEZIRAS KORESPONDI

BRAZILIO

Mazzoleni Tomaso (36-jara s-ro), Rua Taquarémbo, 63-Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.
Paulino Rodrigues Ferreira (20-jara fraŭlo), Rua Jaboatão, 14-Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Maria Lucia da Silva (19-jara f-ino), Rua Iacu, 227 Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Bera Lucia de Silva (16-jara f-ino), Rua Sargto, Moraes Pinheiro, 51, Vila Militar, GB, Rio de Janeiro.

Elza de Azevedo (36-jara f-ino), Rua Mora, 938-Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Celia de Oliveira (16-jara f-ino), Rua Nova Guiné, 345-Senador Camara, GB, Rio de Janeiro.

Iolanda da Silva (20-jara f-ino), Estr. da Posse, 11-Campo Grande, GB, Rio de Janeiro.

Nancy Mebeiros (22-jara f-ino), Rua Justino de Aranjó, 186 Padre Miguel, GB, Rio de Janeiro.

Odilea Castro de Oliveira (17-jara f-ino), Rua Primeira, 40)-Sta. Cruz, GB, Rio de Janeiro.

Odisea Teixeira da Silva (23-jara f-ino), Rua Cérés, 880-Bangu, GB, Rio de Janeiro.

RUMANIO

Dugaescu Liliana (filologia studentino), str. Academici 7, Bucuresti 45.

Costu Aurelia, str. Academici 7, Bucuresti 45.

HISPANIO

Francisco Riveras, Escuela de Aprendices, Mieres (Asturias) — deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun bulgaroj pri astrofilatelio, fervojoj kaj floroj.

KUBO

Hugo Fernandez, Havana, Guanabacoa, Pasaje Uriá 17, Reporto de Beche.

Guerra Ibarra (radioparolisto), Maso 518.

Jose Matilla, Camaguey, Cisneros.

USSR

Du kamaradoj deziras ricevi neuzitajn poŝtmarkojn pri sporto, kosmo, flaŭro, faŭno en kompletaj serioj kontraŭ sovetaj poŝtmarkoj, bildoj, gazetoj ktp:

1.) A. S. Maryenko (21-jara studento), ul. Harkovskaj 2, kv. 51, Dnepropetrovsk 30.

2.) G. I. Švčenko (28-jara studento), ul. K. Libknehta 15, kv. 32, Dnepropetrovsk.

3. Kizjaev Aleksis Iv., ul. Pervomajskaja 50, kv. 43, Tula.

4. Leo Ĉinajev (22-jara studento), str. Komunarov 17, kv. 17, Tula — pri astronomio kaj antikva arto.

ĈEĤOSLOVAKIO

Jozef Pučík, str. Šrobárová 2, Košice — kun bulgaroj, Pl, alumentetiketoj.

Eugeno Bugáro (33-jara instruito), str. Školská 420/4, Hurbunovo (okresa Komárno) — kun bulgaraj knabinoj per Pl pri literaturo, filmoj kaj sporto.

HUNGARIO

100 lernantinoj (15—18-a aj) kaj iliaj 2 instruistoj — kun ĉi, Pl, libroj. Adreso: Géza Kurucz, Bányai Júlia Leánygimnázium, Kecskemét.

Ĉef redaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAŤEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktoro)
Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Forektis: Iv. Sarafov

Adreso de la redakcio:

Sofio, poŝtkesto 66.

Tel 3-26-82

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

abonigas al la jenaj eksterlandaj gazetoj:

Heroldo de Esperanto 4,68

Monda kulturo 4,88

Esperanto (kune kun membreco
al UEA) 4,88

El Popola Ĉinio 1,00

Vietnamio antaŭenmarŝas 1,00

Sumojn kaj abonleterojn sendu al:

Bulgara Esperantista Asocio p. k. 66, Sofio.

Излезе от печат

УЧЕБНИК ПО ЕСПЕРАНТО

от Иван Сарафов и Симеон Хесапчиев

IV стереотипно издание

Цена 0,57 лв.

Доставя се от книжарниците на ДТП „Печатни произведения“ и Българската есперантска кооперация.